# Agadraporto de Vikimedio EO

Peto de Vikimedio EO (VMEO) fariĝi Faka Sekcio de TEJO

## 1. Agado de VMEO

VMEO estas rezulto-bazita organizo - ni sekvas la mision de la Vikimedia movado ("krei mondon en kiu ĉiu homo povas libere partopreni en sumo de homara scio") kaj laboras por efektivigi ĝin per Esperanto, en Esperantujo kaj pri Esperanto.


Tiu ĉi raporteto kovras nur agadon ekde 2012 (inklude), ĉar ĝuste tiam nia organizo komencis havi klarajn konturojn. Pluraj niaj aktivuloj agadis jam antaŭ tiu tempo (ekz. Ziko van Dijk, Yves Nevesteen, Peter Baláž, Marek Blahuš) kaj ni agnoskas ilian kontribuon al starigo de bonaj kondiĉoj por starigo de funkcianta organizo.




*Yves Nevelsteen prelegas kun Ziko van Dijk dum la Kleriga lundo dum UK 2008 en Roterdamo, do 4 jaroj antaŭ koncipiĝo de VMEO. En 2022 Ziko estas Prezidanto de la Revizia komisiono, kaj Yves estas membro de la Revizia komisiono de VMEO.*
*aŭtoro: Ziko van Dijk, GNU FDL / CC BY-SA 1.0 / 2.0 / 2.5 / 3.0,*
[https://commons.wikimedia.org/wiki/File:2008-07-21_uk_vp_02.JPG](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:2008-07-21_uk_vp_02.JPG)

VMEO koncipiĝis en 2012 kaj iom-post-iom plialtigas kvaliton kaj kvanton de sia agado. Ĉar la baza movado kies mision VMEO sekvas kaj en kiun jam frue integriĝis estas la Vikimedia movado, pli kompleta raportaro pri nia agado estas disponebla en la Vikimedia movada retejo en la angla lingvo (la labora lingvo de la internacia Vikimedia movado). VMEO intencas iom-post-iom traduki siajn pasintajn raportojn ankaŭ en Esperanton.
https://meta.wikimedia.org/wiki/Special:MyLanguage/Esperanto_kaj_Libera_Scio/Reports
Eventojn, kiujn ni organizas ekde Majo 2020, ni publikigas ankaŭ en kalendaro en nia retejo:
https://esperanto.wiki/eventoj

Noto: VMEO nek posedas, nek prizorgas, nek respondecas pri Vikipedio kaj ties frataj projektoj. Tiujn posedas, prizorgas kaj respondecas pri ili la Fondaĵo Vikimedio, de kiu ni estas sendependaj. Ni faras sendependajn agadojn por subteni tiujn projektojn kaj la Vikimedian mision en Esperanto, en Esperantujo kaj pri Esperanto.




*Juan Sebastian Quintero Santacruz, kiel ĉeforganizanto, prelegas pri la fotokonkurso* Vikio amas ZEOjn 2018 *dum Vikimanio 2018, la ĉefa jara evento de la Vikimedia movado. En 2022 Juan estas Estrarano de VMEO.*
*CC BY-SA 4.0,*
*https://commons.wikimedia.org/wiki/File:Prelego_pri_Zamenhof-Esperanto-Objektoj_en_Kaburbo_dum_Vikimanio_02.jpg*

## Prelegoj kaj trejnadoj

Agado de VMEO komenciĝis precipe per prelegoj kaj trejnadoj. Niaj aktivuloj partoprenadis diversajn Esperantajn renkontiĝojn kaj prelegis pri la filozofio de libera scio kaj praktiko de redaktado de Vikipedio kaj aliaj Vikimediaj projektoj. La renkontiĝoj ampleksis elde nacia Esperanta kongreso ĝis UK. Post kiam nia aktivulo KuboF Hromoslav iĝis TEJO-trejnisto, kvalito de niaj trejnadoj signife plialtiĝis de metodologia vidpunkto.

## Konkursoj

Nuntempe nia ĉefa agado estas organizado de artikol-verkaj konkursoj kaj similaj kampanjoj en la Esperanta Vikipedio kaj ties frataj projektoj. Konkursoj estas ŝatataj okazoj por iom spicigi laboradon ĉe vikioj kaj aldone ricevi belan premion. Diversaj konkursoj havas malsamajn celojn, ekz. plenigi teman fendon, partoprenigi novulojn, ekuzigi novan ilon ks. Rimedojn por premioj kutime provizas la Fondaĵo Vikimedio. Ankaŭ pluraj Esperantaj organizoj kaj grupoj, kiel UEA, Vinilkosmo, Amikumu, E@I ka. sponsoris niajn konkursojn.



*Statuto de Zamenhof, Litovio; la venka foto de la konkurso* Vikio amas ZEOjn 2018
*Aŭtoro: Fotanto, CC BY-SA 4.0,*
[https://commons.wikimedia.org/wiki/File:STATUO_DE_ZAMENHOF.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:STATUO_DE_ZAMENHOF.jpg)

De inter ĉiuj konkursoj, kiujn ni organizis, 2 aparte distingeblas:

- Vikio amas ZEOjn (2018) - la entute unua (almenaŭ al ni konata) fotokonkurso pri Zamenhof/Esperantaj Objektoj
- Unesko-konkurso (2021) - inspirita rekte de Unesko-funkciulo; iniciatita kaj sponsorita de UEA

Aparte grandan influon havis nia konkurso *Azia monato* en 2019. Ĝi sukcesis varbi novan kontribuanton al la Esperanta Vikivojaĝo (tiam ankoraŭ en testa versio), kio kondukis al ĝia maturigo kaj memstarigo (kiel nur 23a lingva versio de Vikivojaĝo). Danke al tio nun esperantistoj povas facile uzi Vikivojaĝon por prepariĝi por veturo al Esperantaj renkontiĝoj, ferioj ks.



## Kampanjo Vikipedio 300 000

Helpu atingi 300 000 artikolojn en la Esperanta Vikipedio antaŭ Julio 2021!

La Esperanta Vikipedio estas vaste konata kiel la plej granda ĝenerala encikopedio en Esperanto (kaj fakte 1 el nur 2 ekzistantaj). Sian sukceson ĝi ŝuldas al multaj redaktantoj, kiuj dediĉis kaj plu dediĉas nekalkuleblajn horojn al ĝia verkado.

Nun, nia kara Vikipedio pliproksimiĝas al bela mejloŝtono – 300 000 artikoloj. Utilo de Vikipedio multe dependas ankaŭ de fakta kvalito kaj longeco de artikoloj, sed ĝenerale ni povas diri, ke **ju pli multaj artikoloj, des pli utila Vikipedio estas por esperantistoj**.

Tial UEA, ELiSo, ILEI kaj E@I kunigas siajn voĉojn kaj alvokas, ke vi estu parto de tiu historia momento! **Verku novajn artikolojn en la Esperanta Vikipedio kaj helpu atingi 300 000 artikolojn antaŭ Julio!**

## Kiel partopreni?

+ Se vi jam aktivas en Vikipedio
+ Se vi ankoraŭ ne verkas Vikipedion
+ Alternative

## Pri kio verki?

- Temoj , kiujn vi ŝatas kaj pri kiuj vi spertas
- Partoprenu konkursojn
- Unesko-rilataj

*En 2021, laŭ iniciato de UEA kunlaboris VMEO, ILEI, E@I kaj la Fonduso Instigo pri la kampanjo* Vikipedio 300 000 *por pli frue atingi la markon de 300 000 artikoloj en la Esperanta Vikipedio.*
*Fonto: [https://esperanto.wiki/projektoj/vikipedio-300-000](https://esperanto.wiki/projektoj/vikipedio-300-000)*

## Informado

Informado al esperantistoj estas grava parto de nia agado. Ni mastrumas ekz. la Facebook-paĝon de la Esperanta Vikipedio (kun ĉ. 2 500 ŝatantoj) per kiu ni informas pri interesaj kaj utilaj informoj de la Esperanta Vikipedio, kutime ĝenerale pri scienco, kulturo kaj

socio, kaj sufiĉe ofte ankaŭ pri Esperantaj temoj. Foje ni partoprenas en Esperantaj amaskomunikiloj per gazetaj artikoloj kaj komunikoj aŭ gastado en podkastoj.

Aparte grandan akcepton havis niaj komunikoj rilate al grandaj kilometroŝtonoj de la Esperanta Vikipedio. En 2018 ni partoprenis kun UEA verkon de ties gazetara komuniko pri 250 000 artikoloj. En 2021 UEA iniciatis la kampanjon “Vikipedio 300 000” por plirapidigi atingon de tiu marko, kiun ni (kaj kelkaj aliaj gravaj organizoj) partoprenis kaj kreis por ĝi infrastrukturon.

## Eksteraj rilatoj




*Aktivuloj de VMEO dum Vikimanio 2016 renkontiĝis kun Katherine Maher, tiam novelektita Plenuma Direktoro de la Fondaĵo Vikimedio*
*CC BY-SA 4.0, [https://commons.wikimedia.org/wiki/File:ELiSo_and_Katherine_Maher.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/File:ELiSo_and_Katherine_Maher.jpg)*

VMEO staras per 1 piedo en la Vikimedia movado kaj per alia piedo en la Esperanta komunumo. Tial ni ofte (oficiale aŭ neoficiale) reprezentas unu movadon ĉe la alia. Ni estas invitataj al pluraj Vikimediaj renkontiĝoj (kutime kun repago) kaj niaj aktivuloj danke al sia volontula laborado pli probable ricevas subtenon por plia partopreno. Dum Vikimediaj renkontiĝoj ni (depende de tipo de renkontiĝo) krom aliaj prezentas nian organizon kaj agadon, organizas renkontiĝeton de esperantistoj, traktas eblan kunlaboron ks. Ene de la Vikimedia mondo estas Esperanto aprezata ĉar ĝi estas pionira (Chuck Smith fondis la Esperantan Vikipedion kiel nur 11an Vikipedion entute; Esperanta Vikimedia komunumo aktive partoprenas en antaŭenigo de novigoj ks.), sed ankaŭ nesufiĉe konata (falsaj stereotipoj kaj antaŭjuĝoj foje surfaciĝas). Tial VMEO dum taŭgaj okazoj prezentas al Vikimediaj aktivuloj pli veran flankon de Esperanto kaj

Esperantujo. Ekz. surbaze de diskutoj pri unu nia specifa subvencipeto, kiun la Fondaĵo Vikimedio rifuzis provizi al ni, estis ŝanĝitaj aplikataj reguloj kaj Esperanto iĝis rajtigita ricevi subvenciojn, kiuj temas specife pri ĝi.

# 2. Rekomendoj de kelkaj elstaraj esperantistoj

Vikimedio EO samtempe petas aliĝon al TEJO kaj al UEA. Kelkaj petitaj elstaraj esperantistoj subtenis tiu(j)n aliĝo(j).

## Chuck Smith (Esperantisto de la Jaro 2015)



Vikipedio estas gravega parto de Esperanta kulturo, kiu ne nur havas multegajn informojn pri ĉiaj temoj, sed ankaŭ estas bonega bazo por normigo de vortoj, speciale de fakterminoj. Vikimedio estas esenca organizo, kiu subtenegas Vikipedion kaj mi forte rekomendas ĝin kiel Fakan Asocion de UEA.

Chuck Smith, Fondinto de la Esperanta Vikipedio

(foto de Aleks Andre)

## Peter BALÁŽ (Esperantisto de la Jaro 2012)



Mi - Peter Baláž ĉeestas kaj helpas al agado de Esperanto kaj Libera Scio jam de pli frue ol la grupo memstariĝis. Ilia fokuso ĉiam estis kaj plu estas helpo al la Esperantaj Vikipedio kaj aliaj Vikimediaj projektoj, kio konsekvence helpas al tuta Esperantujo. La grupo videble profesiiĝas kaj estos bona aldono al la Fakaj Asocioj Kunlaborantaj de UEA. Ĝia laboro estas ege grava kaj utila por tuta nia movado, do ĝi certe estos same utila FA de UEA/TEJO.

amike Petro
E@I-kunordiganto
SKEF-prezidanto

(foto de Michal Matúšov)

## Mireille GROSJEAN (Esperantisto de la Jaro 2014)



Mirejo Grosjean subtenas la komencon de ligo kaj kunlaboro inter UEA kaj la Faka Asocio Esperanto kaj Libera Scio
Tuj kiam mi esperantistiĝis, mi ekhavis rilatojn retajn kun afrikanoj. Ili skribis al mi: "Ni petegas vin eŭropanojn, ke vi verku mallongajn sed precizajn prezentaĵojn pri ĉiuj fakoj, kun la celo, ke ni povu lertiĝi sen uzi la koloniajn lingvojn." Mi bone komprenis ilian bezonon, tamen mi tuj konsciiĝis, ke tia entrepreno estas giganta. Tamen mi nun konstatas, ke tio ekzistas, tio estas


VIKIPEDIO, la Esperanta versio de VIKIPEDIO. Mi ankaŭ aŭdis de junuloj esperantistaj en Vjetnamio la aserton: "Ĉio, kion ni konas de la mondo, estas el la enhavo de VIKIPEDIO en Esperanto".
Kiel prezidanto de ILEI mi verkis pri la celo atingi 300 000 artikolojn en la Esperanta versio de VIKIPEDIO jam en IPR 2021/1. Laŭ la disponebla tempo mi modeste kontribuis al tiu atingo. Mi konstatas, ke vigla skipo de talentaj junuloj gvidas la Asocion EO kaj Libera Scio kaj kapablos ankrigi la Movadon en la teknikon de la tria jarmilo kaj nutri la scivolemon de multaj movadanoj. Pro tio mi subtenas la kandidatiĝon de tiu Asocio kiel Faka Asocio de UEA kaj de TEJO.

elkore salutas

Mireille Grosjean

(foto de Mireille Grosjean)

## Floréal MARTORELL



Mi cxi subskribite Floreal Martorell prezidanto de EUROKKA
Atestas ke ni kunlaboras Kun la organizo Esperanto kaj Libera Scio jam de kelkajn jarojn.

Ili faras utilan laboron pri Esperanta Vikipedio kaj helpas al Esperantujo.

Ili sincere klopodas kaj laŭ tempo pliboniĝas kaj estos bona Faka Asocio de UEA.

Plej muzikajn salutojn de
Floréal MARTOERLL
Prezidanto de EUROKKA

# 3. Ligiloj al aldonaj dokumentoj

- Jara plano 2022
- Jara buĝeto 2022